



**Aprilo 2017**

# **Oomoto Internacia**

**(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)**

**No.16 / 01.04.2017**

## **Enkonduko pri Oomoto**

### **La instruoj de Oomoto**

#### **La kvar Grandaj Principoj**

##### **= La Leĝo de la Universo**

En nia ĉiutaga vivo, por ni estas grave praktiki sekvantajn kvar principojn de la universo, kie ni vivas. Tiu ĉi estas exenco realigi verajn feliĉojn.

#### **La Principo de Progresismo**

Ĉiuj estaĵoj sur ĉielo kaj tero konstate agas kun deziro progresi kaj antaŭeniri. Tamen ne simpla estas la vojo de progreso. Sur ĝia vojo foje ni sentas nin restantaj aŭ ree ripetantaj samajn aferojn. Tamen por ni gravas kompreni, ke tio estas etapo necesa al ni progresi kaj, kaj gravas antaŭeniri ĉiam positive.

#### **La Principo de Unueco**

Purigado, Optimismo kaj Progresismo gravas, kaj ankaŭ Unueco gravas por la mondo, societo, familio kaj popolo. Sen tio neniu estas. Por ni gravas, ke ni ĉiam estu konscia pri unueco, kaj vivu rigardante la centron.

## **Introduction about Oomoto**

### **The Teachings of Oomoto**

#### **The Four Great Principles**

##### **= The Laws of the Universe**

In our daily lives, it's important to practice the following four principles of the universe we live in. This is essential to realizing true happiness.

#### **The Principle of Progressivism**

All things on heaven on earth are constantly moved by the wish to make progress and advance. However, the way of making progress is not simple. It may feel as though you have come to a standstill, or are repeating the same thing over again, but it's important to realize this is but a necessary stage of advancing, and always move forward with a positive outlook.

#### **The Principle of Unity**

Purification, optimism, and progress are all important, but without unity, the world, society, family and people will amount to nothing. It's important to always be conscious of unity, living our lives without losing sight of the center.

**Copyright (C) 2017 Jinrui Aizenkai-ULBA (Universal Love and Brotherhood Association )  
All Rights Reserved.**

**Ten'on-kyo, Kameoka, Kyoto, Japan 621-8686  
<http://www.jinruiaizenkai.jp/> <http://www.oomoto.or.jp/>**



Aprilo 2017

# Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.16 / 01.04.2017

## Diaj Revelacioj

La 26-an de novembro (luna) en la 4-a jaro de Tajŝoo (1915)

Ĉe ĉio la malplej komprenemaj estas garddijoj malaltrangaj, sed ĉiamaniere Mi ŝanĝos ilian koron, eĉ se ili obstine rezistos. Inter ili troviĝas tiuj, kiuj ne povas ŝanĝi sian koron nur per riproĉo; Mi do ŝanĝos ilian koron per la dono de ĝojo. Koncerne la rubspiritojn inter la garddijoj, t.e. tiuj, kiuj povas nenion kompreni kaj kiuj estas neniel saveblaj, Mi jam trovas nenian rimedon krom aranĝi laŭ Ĉielaj reguloj.

Kiam la Ĉiela Dio finfine ordonos al diverslandaj dioj la praktikon de la malkonstruo, Mi, Dio Uŝitora aŭ Kunitokotaĉi, funkcios kiel ĉefkomandanto kaj utiligos la diojn pluvan, ventan, rokan, tondran, tertreman kaj aliajn senlime multajn vasal-diojn. Tiam, dumtempe la mondon regos granda furiozo; Mi tamen intencas laŭeble kviete gardigi al ili la mondon. Sed, kion Mi unufoje eldiris, Mi nepre realigos. Sekve, escepte de tiuj, kiuj povos Min obei nur per Mia unufoja konsilo, neniu povos ricevi Dian favoron sufiĉe.

### Diaj Revelacioj de Oomoto el sep volumoj.

Unu el du bazaj sanktaj skriboj de Oomoto. Kvankam analfabeta, Fondintino Nao aŭtomate (psikografie) skribadis la vortojn de Dio Uŝitora en la stato de la Diposedo. Ĝia enhavo konsistas plejparte el rondaj kanaoj (Hiragana) kaj la kvanto atingis 200,000 foliojn da japanaj paperoj en la daŭro de 27 jaroj. Majstro Onisaburo redaktis ĝin, aldonante ĉinajn literojn (Kanĝi) kaj publikigis kiel la bazan sanktan skribon "Diaj Revelacioj de Oomoto (Oomoto-Ŝinju)".

## Divine Revelation

November 26, 1915

Among these, the third tutelars are the most incorrigible. If they will not reform themselves, they will be made to do so by all means; there are some who will not be able to mend their ways unless made to do so with pleasure instead of by chiding only. What shall be the fate, however, of the most incorrigible ones? Such rubbish must be cleared away according to the laws of Heaven and Earth. There is no other way.

Once the Lord of Heaven issues an order to the angels of various countries Ushitora no Konjin as commander-in-chief, will employ the Power of Rain, Wind, Rock, Tempests, as well as hundreds of deputies. Then, things violent and intense will happen for a while; they will preserve the World's calmness if possible; but when things come under the protection of the ancient Deathless Spirit with the genuine Spirit of the Heavenly Kingdom, you will remember what has been told to the souls that have come here, things which shall be done just as was once said. Unless you have the spirit to hear Him at once, you will not satisfy him.

**Divine Revelation** (Sacred Texts of Oomoto). Seven volumes in total.

Although the Foundress Nao was illiterate and could neither read nor write, while visited by the spirit of Divine Ushitora she began recording his words using automatic writing. Writing almost entirely in the hiragana syllabary, Nao transcribed the "Ofudesaki" (the Tip of the Brush) on over 200,000 sheets of paper, working on it for 27 years until her passing.

Onisaburo edited and assigned kanji characters to the Ofudesaki, and it was published as Oomoto's core spiritual teaching, the "Oomoto Shinyu".



Aprilo 2017

# Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.16 / 01.04.2017

## Diaj Vojsignoj

### Ĉapitro 2

128. Homaj korpo kaj animo ambaŭ estas apartenaĵoj de Dio. Pro tio, se vi deziras servi al Dio, oferu viajn korpon kaj animon al Dio kaj preĝu al Li por la mondo kaj la vojo.

129. Dio bone scias, kien homoj iras, ĉar Li rigardas de kaŝita loko. Tial, protektante la korpon kaj koron de tiu, kiu volas iri ĝustan vojon, Dio faciligas la vojradon.

130. Preĝu rektanime kun pura koro al Dio, por saviĝi supren al Dia regno, kun nenia provo fare de Dio.

131. Dio kreis ĉion senkomencan kaj senfinan per la spirito senkomenca kaj senfina, per la forto senkomenca kaj senfina. Ĉar Lia forto estas senkomenca kaj senfina, por Li estas nenio neebla. Sekve, kion homo deziras kaj petas al Dio, ĉio estas donata. Se tio, kion homo deziras, estas ne donita, aŭ se li ne estas savita malgraŭ la peto, ĉion kaŭzas la malbonaĵo en lia koro. Do, kiu volas ricevi Dian favoron, forpelu tiun aganton el la koro, laŭeble tuje.

132. Ĉi tiuj vortoj estas la lumo de la mondo, tial ke ili estas la senperaj instruoj laŭ la internofluo de Dio. Pro tio, profunde kulturu vian dikredon per legado de ĉi tiu skribo kaj kompletigu vian konduton, kaj vi estos favorata per la forto, kiu malfermos vian animan okulon.

133. Ĉi tiuj vortoj estas savŝipo de la mondo; ili estas vera vivŝnuro; ili estas vera nutraĵo por la homa animo. Ili estas trezoro, kiu neniam putras dum daŭras ĉi tiu mondo.

**Diaj Vojsignoj** estas sankta libro, verkita de Majstro DEGUĈI Onisaburo, Kunfondinto de Oomoto (1871-1948). Plenigita de la Dikaraktero de la Spirito de Mizu, li skribis en 1904, kiam li estis 33-jaraĝa, en Ajabe, en la gubernio Kioto, Japanio.



“Diaj Vojsignoj”  
internacia  
eldono

## Divine Signposts

### Chapter 2

128. The human body and soul both belong to God. Therefore, if you wish to serve God, offer your body and soul to Him and pray to Him for the world and for the way.

129. God knows well where human go, for He is looking from a hidden place. Therefore, protecting the body and spirit of those who wish to take the correct path, God makes the going easy.

130. Pray with an unwavering mind and with a pure heart that you may be saved into the Divine kingdom, without any trial from God.

131. God created all things, without beginning and without end, with the spirit without beginning and without end, and with the power without beginning and without end. Because His power is without beginning and without end, for Him nothing is impossible. Consequently, all that a human being desires and asks of God is given. If that which a human being desires is not granted, or if he is not saved despite his asking, this is only because of the evil in his heart. He who wishes to receive God's favour should expel this evil from his heart as quickly as possible.

132. These words are the light of the world, because they are the direct teachings according to the inflow of God. Nurture your faith well, therefore, reading these writings, and perfect your behaviour; you will be favoured with the power which will open the eyes of your soul.

133. These words are a ship of salvation for the world. They are a true lifeline; they are the true nourishment of the human soul. They are a treasure which will never decay while the world continues to exist.

**Divine Signposts** is a sacred text written by Onisaburo DEGUCHI, the Co-Founder of Oomoto (1871-1948). Imbued with the divinity of the Spirit of Mizu, he wrote it in 1904, at the age of 33 years, in Ayabe, Kyoto Prefecture, Japan.



Aprilo 2017

# Oomoto Internacia


(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.16 / 01.04.2017

## Esplorado de Vivĝojo

### 1. Deziro esti feliĉa

#### Faru sian plejblon



Ĉiuokaze homo nur estu vere fidela al la nuna tutmemo. Postuli pli ol tion estas vane kaj nenature.

Homo emas pensi, ke “mi” restas la sama jam de la naskiĝo. Ne, “mi” tute ne estas senŝanĝa. Senŝanĝa estas nur la abstrakta, daŭra nomo “mi”, sed ĝia enhavo ŝanĝiĝadas ĉiumomente, nur kun rilata unueco inter antaŭa “mi” kaj posta.

Vera “mi” estas nur la nuna “mi” sola. La antaŭa kaj la posta estas nur mia antaŭirinto kaj postvenonto.

Tial la homo devas vivi kun la nuna plejblo, kaj la vera feliĉo estas nur en tio. Ne troveblas vera feliĉo, krom en ĉiumomenta tutmema agado. Tiamaniere la enhavo de “mi” ĉiumomente pliriĉiĝadas kaj pliprosimiĝadas iom post iom al la perfekteco. Kaj tiel lia agado fariĝas pli kaj pli kompleksa kaj delikata. Jen la ordo de la progreso de homa vivo.

Ĉar estas morgaŭ, ni diligentas kaj abstinas hodiaŭ.


Se absolute ne ekzistus la morgaŭa tago, kiu povus hodiaŭ fervore studi kaj esperi?

“Esplorado de Vivĝojo” estas libro verkita de la Tria Kungvidanto DEGUĈI Hidemaru (1897-1991). Ĝin ni kompilis el “Memornotoj de mia kredado” de li el 8 volumoj, kiuj konsistas el la frazoj elĉerpitaj el liaj taglibroj de liaj studentaj tagoj.

## In search of Meaning

### 1. The Heart in Serch of Happiness

#### Doing One's Best



At any rate, as long as man is truly faithful to his whole self at all times, he has done the best that he can. It would be too much to demand any more of him.

“In Search of Meaning”  
Hidemaru  
Deguchi

We are apt to think that our “self” has been the same since we were born, but self is far more variable.

The only thing unchangeable about the self is the name, for its substance keeps changing at every moment. We know only that there is relation and coordination in the sequence of its development.

True self can only be the self of this moment --- all else is merely its antecedent and sequel.

In this sense, man should live fully in the moment. This is where true happiness lies. More precisely, true happiness, true happiness exists nowhere else but in the entire activity of the self at each moment. In this way, the substance of “self” is constantly enriched, and gradually approaches a state of perfection. Its entire activity becomes more complex and precise. Thus does human nature grow step-by-step.

Because there is always tomorrow, we make efforts today, and behave prudently.

If there were no tomorrow, who would study hard today, or anchor his hope in the future?

“In Search of Meaning” is a book written by Hidemaru Deguchi (1897-1991). This book is the excerpt from the diary Hidemaru kept writing when he was a university student. It was a little compiled from the original text in order to focus on the general readers.



**Aprilo 2017**

# **Oomoto Internacia**

**(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)**

**No.16 / 01.04.2017**

## **Ĵinrui Aizenkai**

**Ĵinrui Aizen (Universala Homama Asocio),  
Ĉiu Religio Originas el Sama Fonto**

### **Laboro Realigi Simbiozan Mondon**

Rekoninte nian komunan spiron trans raso, lando kaj religio, Oomoto establis Ĵinrui Aizenkai en 1925, kaj dediĉis sin kunlabori por realigi la eternan mondpacon. Ekde tiam tiu organizaĵo gajnis multajn subtenantojn tra la mondo, kaj daŭrigis ĝiajn aktivadojn ĝis nun.

### **Ĉiu Religio Originas el Sama Fonto**

Multaj veraj religioj trovitaj en la mondo ĉiuj originas el la sola origino. Ne batalu super diferencoj de iliaj instruoj, sed la vera celo de tiuj religioj estas kunlabori harmonie por realigi komunan celon de paco. Surbaze de tiu ĉi instruo de Bankjo-Dookon (Ĉiu Religio Originas el Sama Fonto), Oomoto lanĉis la Religiian Federacion en la Mondo en Pekino, 1925, kaj de la frua tempo ĝi prenis iniciaton por interreligiajn amikecojn kaj laborojn.

### **Mondfederacio**

Krom tio Oomoto estis ĉiam aktivas antaŭenigi la movadon “Mondfederacio”, la modelon de glob-paciismo fondita sur internacia leĝo primare ol militfortoj. Ĝi respektas la mem-regadon de ĉiu nacio, kaj tio eblas ligitan rezolucion por internaciaj problemoj rilataj al ĉiuj nacioj.

## **Jinrui Aizenkai**

**Jinrui Aizen (Universal Love & Brotherhood)  
All Religions Spring From the Same Root**

### **Working to Realize a Symbiotic World**

Recognizing our common aspirations beyond race, country and religion, Oomoto established the Jinrui Aizenkai in 1925, dedicated to working together to realize a world of lasting peace. Since then this organization has gained many supporters around the world, and continues its activities to this day.

### **All Religions Spring From the Same Root**

The many true religions found in the world all spring from a single source. Rather than fighting over differences in their teaching, the true purpose of these religions is to work together in harmony to realize a common goal of peace. Based on its teaching of Bankyo Dokon (All Religions Spring From the Same Root), Oomoto launched the Federation of World Religions in Beijing in 1925, and has been a pioneer of global interfaith exchange and cooperation ever since.

### **World Federation**

In addition, Oomoto is also actively promoting a “World Federation” model of global pacifism founded upon international law rather than military power. While respecting the self-governance of each nation, this enables the joint resolution of international problems that affect all nations.



Aprilo 2017

# Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.16 / 01.04.2017

## NOVAĴO

Somera Tendaro por infanoj organizita de la Sudamerika Centro de Oomoto

De la 20-a ĝis la 22-a de januaro, 2017, en la Sudamerika Centro de Oomoto Hakkouen, la 44-a Somera Tendaro por infanoj okazis, kiun entute 120 personoj partoprenis, t.e. 60 infanoj kaj multaj

helpantoj. "Optimismo" estis la temo por tiu ĉi jaro. Jenaj programeroj vicis: prelego pri Oomoto de Yasuharu Fujimoto, la speciala misiisto por Brazilo, la prelegetoj pri la spertoj en Oomoto de junuloj, gvido pri meditado, dramo pri la historia persekutado al Oomoto, praktikado de Aikido, kantado de Aizenka (kanto de Oomoto) kaj multaj ludoj.

Kaj ĉiu ĉeestis en matenpreĝo kaj vesperpreĝo, en kiuj ĉiu recitis Norito-jn kaj kantis la himnojn de Oomoto en la portugala. La partoprenantoj ankaŭ ĝuis kune manĝon, kareon kun rizo, dume pli junaj infanoj kuiris kukojn helpe de subtenantoj. En la okazaĵo ni havis ankaŭ folkloran dancon, kandelan servon kaj atletiketan kunvenon, kiu kontribuis multe al ĉiuj interamikiĝi kaj havi spertojn. La speciala programero estis fervore kompeni "Mottainai" (esti ŝparema kun dankemo), en kio la infanoj provis lavi telerojn per tre limigita akvo kaj ili provis uzi samgrandan botelon kun sia nomo sur ĝi. Tio celis praktikan instruon al la infanoj tiel kompreni kaj apliki Mottainai.

## NEWS

Summer Camp for children sponsored by The South American headquarters of Oomoto



2017, January 20th through January 22nd at Hakoen, the venue for the 44th Summer Camp for children was held, 120 participants with 60 children and many helpers. This year's "THEME" was called "Optimismo".

The program line up was, lectures on Oomoto by Yasuharu Fujimoto, Special missionary to Brazil, Mini-lectures on their experiences in Oomoto by youths, a meditation guidance session, the appreciation of Drama focussed on the historical Oomoto Persecutions, Aikido practice, Aizenka (Oomoto songs) and many game playing.

In addition, everybody joined in morning and evening services reciting Norito and singing the Oomoto Hymn, of course, all in Portuguese. Participants also enjoyed cooking curry together while, younger infants were making cookies with help from staff, which later we ate together. Also, in this event we had folk dancing, candle service and mini-athletic meet, which contributed to the greater friendship and experiences for all. This special program was dedicated in how to appreciate "Mottainai" (not to be wasteful), where children were trying to wash dishes with very limited water and tried to use the same pet bottle with their name on it. This was the practical way to teach children how to understand and apply Mottainai.



Aprilo 2017

# Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.16 / 01.04.2017

## NOVAĴO

### Mongolia Centro de Oomoto

La 3-an de februaro, 2017, s-ro Altai—Baatar (Esploranto pri Religia Studo) el Mongolia Ŝtata Akademio de Filozofio kaj Scienco vizitis la Mongolian Centron de Oomoto. Dum lia vizito li esprimis lian vidpunkton, la gravan rolon de religioj plenumataj en la socioj. Joŝiaki Onicuka, la respondetulo Mongolia Centro de Oomoto, klarigis resume la instruojn de Oomoto al s-ro Altai—Baatar. Sekve Onicuka montris al li kelkajn DVD-ojn pri Oomoto, Ĵinrui-Aizenkai, Aikido kaj ankaŭ kelkajn librojn pri Oomoto de Nao Degučĉi kaj de Onisaburo Degučĉi en la angla lingvo.



## NEWS

### Oomoto Mongolian Centre

February 3rd, 2017, Mr. Altai Baatar, Researcher on Religious Study ) from Mongolian State Academy of Philosophy and Science visited the Oomoto Mongolian Centre.

During his visit, he expressed his viewpoint of the important role religion plays in society. Yoshiaki Onitsuka, in charge of the Oomoto Mongolian center, explained the teachings of Oomoto briefly to Altai

Baatar and then Onitsuka gave him some DVDs on Oomoto, Jinrui Aizenkai, Aikido and also some books on Oomoto, Nao Deguchi and Onisaburo Deguchi in English.

### Filio de Oomoto en Romo Po-taga Kalendaro surtabla per la itala

Po-tagajn Kalendarojn surtablajn en la itala ni presis en Mongolio, kaj sendis ilin al Romo la 22-an de februaro, 2017. Sur ĉiu folio de la kalendaro ni trovas la instruojn de Oomoto, kaj ni nomas ĝin “La instruoj de Oomoto, la spegulo de la koro” en la itala. La kalendaron ni presis la unua en la japana okaze de la deka datreveno ekde la enfunkciiĝo de Kurenai Degučĉi al la Kvina Gvidantino de Oomoto.

Nun la kalendaro estas presita en tri lingvoj: la japana, la itala kaj la mongola. Ni esperas, ke pere de la filio de Oomoto en Romo, la kalendaro estu bona por italoj kompreni sian vojo de la vivo.



### Oomoto Rome Branch A Daily Desk Pad Calendar in Italian

A Daily Desk Pad Calendar in Italian, produced in Mongolia, and sent to Rome on February 22nd, 2017. This calendar displays the teachings of Oomoto and is called “Oomoto Teaching, A Mirror of the Mind” in Italian.

This calendar was made in Japanese as the 10th anniversary since Kurenai Deguchi assumed the leadership of Oomoto. At the present time, this calendar is made in Japanese, Italian and Mongolian languages. We hope through Oomoto Rome, this calendar will be of good use for Italians who wish to understand our way of life.



Aprilo 2017

# Oomoto Internacia

(Oomoto International / Jinrui Aizenkai)

No.16 / 01.04.2017

## NOVAĴO

### Granda Secubuna Festo de Oomoto

La Secubuna Granda Festo de Oomoto okazis en la templo "Ĉoosej-den" en urbo Ajabe, Japanio, de la 3-a ĝis la 4-a de Februaro, 2017. La okazaĵo estis memore al la 125-a datreveno de la fondiĝo de Oomoto. 3.000 personoj estis adorantoj.

La 3-an de Februaro, 1892, la fondintino Nao Degučî estis diposedita de la Sankta Spirito,

kiu instrukiis ŝin ekskribi la Sanktan Skribon. Tiu ĉi granda festo celebras tiun Sanktan Mesaĝon. En la tago Oomotanoj preĝas por la mondpaco kaj la feliĉojn de ĉiuj homoj. Tiu estas Granda Puriga Rito tra la nokto, kaj dum la festo la kredantoj dediĉas sin por purigado de la tuta universo, de sia familio kaj de si mem. Tiu vintra festo ankaŭ havas celebradon preĝi riĉan rikolton de grajnoj en la aŭtuno. Ili ankaŭ festas la naskiĝtagon de la Dua Spirita Gvidantino, Sumiko Degučî, kaj tiun de la Kvara Spirita Gvidantino, Kiyoko Degučî.

### Pri la Granda Puriga Rito

La Granda Puriga Rito en la japana tago Secubuno fariĝis la solena okazaĵo en Oomoto kelkaj jaroj post ĝia fondiĝo. Antaŭ la rito kredantoj skribas sian nomon kaj adreson sur la malgranda papero, sur kiu troviĝas presita figuro simbolanta homon; la papereto reprezentas la homon koncernatan. La paperetoj estas kolektataj el la tuta lando eĉ el malproksimaj landoj eksteraj. En Ĉoseiden en Ajabe plena de adorantoj pasigas la tutan nokton per la preĝo. Centoj da virinaj kaj viraj festservantoj preĝas sur ĉiu papereto kaj enmetas en senglazuritan poton. En malnova tempo oni enfluigis ilin en la akvon de la Rivero Ŭaĉi, kiu iras tra la urbo Ajabe, post la preĝo. Tiamaniere purigado okazas kaj oni evitas iujn malfeliĉojn.

## NEWS

### Setsubun Grand Festival of Oomoto

The Secubuna Grand Festival of Oomoto took place in the temple "Ĉoosej-den" in city Ajabe, Japan, from the 3rd to the 4th of February, 2017.

The event was in memory of the 125th anniversary of the founding of Oomoto. 3,000 people were worshippers.

On February 3, 1892, Foundress Nao Deguchi became possessed by the Divine

Spirit, which marked the beginning of her sacred transcriptions. This grand festival celebrates this Divine Message. On this day, Oomoto followers pray for world peace and the happiness of all humanity. There is a Great Purification Ritual, an all-night event during which followers devote themselves to purifying the entire universe, beginning with purifying oneself and one's family. This winter celebration also includes prayers for a year for fruitful harvests, and honors the birthdays of the Second Spiritual Leader, Sumiko Deguchi, and the Fourth Spiritual Leader, Kiyoko Deguchi.

### About the Great Purification Ritual

The Great Purification Ritual on the Japanese Setsubun holiday has been a solemn occasion within Oomoto since shortly after the religion was founded. Before the ritual, followers write their name and address on a small slip of paper with symbolic human figure printed on it; this paper slip is then used as a representation of the person concerned. These paper slips are collected from all over the country and even from far overseas at Choseiden in Ayabe, where worshippers fill the Hall and spend the night absorbed in ritual prayer. Hundreds of female and male priests pray over each of the slips as they carefully place them into unglazed earthenware jars. More ancient Shinto prayers are recited as these slips are later floated in the pure waters of Wachi River, which courses through Ayabe City. In this way, purification takes place and potential misfortunes are averted.

